



tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

E@I
planas
plurajn
novajn
projektojn



**Pokerturniroj
por espe-
rantistoj**

**Nova TEJO-
volontulo
serĉata**

**Sakraĵ-
konkurso**



Saluton!

En ĉi tiu numero vi trovos longan artikolon pri la promesoplenaj projektoj kiujn planas E@I. Aldone vi trovos alvokon al kandidatigo kiel TEJO-volontulo, prezenton de TEJO-membro el Ĉednestrujo (Moldavio) kaj plurajn interesajn artikolojn pri tiel diversaj temoj

kiel sakrajkonkurso, pokerturniro, unujariĝo de la Esperanto-urbo Herzberg kaj la nova repaĝaro Klaku.net.

Kvankam en la momento, kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn, la IJK en Vjetnamo ĵus sukcese pasis, vi devos atendi TT-an raporton pri ĝi ĝis la venonta numero. Intertempe vi povas legi interesan raporton pri ĝi en la blogo de Haris SUBAŠIĆ: tejo.org/eo/blog/46

Ankoraŭ ne estas decidite, kie okazos la venontjara IJK, sed espereble mi povos informi vin pri tio en la venonta numero de TT.

Mi esperas ke en la diverseco de ĉi tiu numero estas io por ĉies intereso.

*Agrablan legadon!
Marcos*

Nova filmo en Esperanto

La brazila entrepreno Imagu-Filmoj, kiu jam filmigis la faman romanon "Gerda malaperis" nun produktis duan filmon. La emocia filmo "La Patro" baziĝas sur verko el la japana literaturo. Varbfilmeto por la filmo aperis ĉe Farbskatol' (tinyurl.com/2qnlpp). La 40-minuta filmo mendeblas rekte ĉe Imagu-Filmoj (www.imagu.com.br), ĉe peranto en via lando (listo de perantoj troveblas ankaŭ sur imagu.com.br) aŭ ĉe retbutiko.net.

Enhavo

Salutvorto de la prezidinto	3
Rubriko TEJO-membroj	3
Novaj projektideoj de E@I	4-8
Pokerturniro por Esperantistoj	9
Informvideo pri Raporto.info	9
Volontuli en Afriko	10
Esperanto-ubro Herzberg 1-jara	10-11
Informu pri via agado sur tejo.org	12
Sakrajkonkurso	12-13
Ago-Tago en Kubo	13
Klaku.net	14
Kontakt-informoj kaj informoj pri TEJO	15
TEJO serĉas volontulon!	16

Limdato por 2007:5 – 15-a de novembro 2007!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu (prefere) rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Nürnberger Straße 27a, 04103 Leipzig, Germanio. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton. Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanio/Britio). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Pollando; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Salutvorto de la prezidinto



David-Emil en vjetnama televido

Kiam vi legas tiun ĉi mesaĝon, la IJK jam pasis kaj mi eniris la liston de prezidintoj de TEJO. Unu el la grandaj defioj de junularaj organizoj estas ke la vivstatuso de sub-30-jaruloj povas sufiĉe rapide ŝanĝiĝi: ekz-e de lernanto al studento aŭ laboristo, de unopulo al kunulo aŭ eĉ patro/patrino. Tiaj ŝanĝoj povas postuli multe da tempo kaj tiam ne eblas plenumi siajn organizajn taskojn kontentige. Same por mi – post pli ol 11 jaroj de aktiveco en la Esperanto-movado mi pro ŝanĝoj (kaj profesiaj kaj personaj) sentis ke estas tempo bremsi miajn aktivecojn kaj retiriĝi el la junulara movado (nu, mi preskaŭ havas 29 jarojn, do mi ankaŭ ne apartenas al la plej junaj...). Estas iomete stranga sento forlasi agadon kiun mi ŝatas, sed estas tempo por novaj aktivuloj kun freŝaj ideoj. Tamen mi kompreneble sekvas tion kio okazos kaj restas je la dispono de miaj posteuloj.

Rubriko TEJO-membroj

- Kiel vi nomiĝas?

Mi nomiĝas Olga KHROMOVA (iama GRIBOVAN)

- De kiu lando vi venas, kaj kie vi nun loĝas?

Mi naskiĝis en Moldavio kaj nun loĝas en Tiraspol, la ĉefurbo de Ĉednestrujo, kiu apartiĝis de Moldavio en 1991, sed ĝis nun ne estas rekonita en la mondo kiel aparta ŝtato.

- Kiom da jaroj vi havas?

Mi havas 28 jarojn.

- Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?

Mi esperantistiĝis en 1999 en la Ukraina urbo Odeso, kie mi fariĝis aktiva ano de la loka junulara klubo "Verdaĵo". Mi ekvidis murgazeton en unu lernejo kaj tuj ekvolis lerni la internacian lingvon kiu ŝajnis tiom nireala kaj alloga. En 2004 mi trovis bonan laboron en Tiraspol kaj decidis reveni al patrujo. La Esperanto-movado ĉi tie preskaŭ ne ekzistas kaj mi dume planas organizi la Esperanto-kurson en la urbo.

- Kiujn ŝatokupojn vi nun havas?

Vere, la ĉefa ŝatokupo estas Esperanto. Kiam

mi pro personaj kialoj ne povas renkonti Esperantistojn aŭ partopreni en Esperanto-aranĝoj, eĉ paroli Esperante kun mia ŝatata instruistino el Odeso, mi sentas soifon pri Esperanto. Sed mi ankaŭ ŝatas fremdajn lingvojn (inkluzive la anglan), ŝatas legi utilajn kaj ne tro utilajn librojn kaj naĝi.

- Kio estas via vivmoto?

Faru bonon malgraŭ ĉio.



Olga kun ŝia filino Nastja

E@I planas novajn projektojn

Verŝajne vi jam aŭdis pri E@I aŭ pri unu el ĝiaj projektoj kiel *lernu!* aŭ Edukado.net. De 1999 ĝis 2005, E@I estis neformala laborgrupo sub la nomo Esperanto@Interreto. En 2005 ĝi registriĝis kiel sendependa organizo. La mallongigo E@I (elparolata kiel "e ĉe i") nun havas plurajn interpretojn, interalie Edukado@Interreto.

Ĝis nun E@I jam iniciatis plurajn valorajn projektojn:

- Lernu.net – la multlingva retpaĝaro por la lernado de Esperanto.
- Edukado.net – la paĝaro, kiu kolektas materialon por Esperanto-instruistoj
- Reta Informado-Centro (informado.net) – kiu kolektas informmaterialojn pri Esperanto
- Artista Datumbazo (artista.ikso.net) kun informoj pri Esperantaj artistoj (ĉefe muzikistoj)
- Lingva prismo (lingvo.info) – plurlingva paĝaro, alloge informanta pri lingvoj de la mondo
- Nitobe-centro pri lingva demokratio – plurlingva centro pri internacia komunikado kaj egaleca lingvopolitiko
- kaj pluraj aliaj

Pluraj projektoj de E@I estas finance subtenataj de ESF (*Esperantic Studies Foundation* - Fondaĵo pri Esperantaj Studoj). La aktivuloj de E@I jam havas ideojn pri novaj projektoj, kiuj antaŭenigos Esperanton en la Interreto kaj per la Interreto. Por diskuti kun ESF pri ĉi tiuj projektideoj okazis telefonkunsido inter E@I-aktivuloj kaj ESF-estraranoj je la 4-a de junio kaj sekve ankaŭ la E@I-kunsido en Litovio, inter la 13a-16a de julio. Ĉi-sube vi trovos detalojn pri diversaj projektideoj kaj reagoj de ESF al ili:

Inform-portalo pri Esperanto, la movado kaj multlingveco

La Esperanto-movado estas tre fermita rondo; kutime informado pri diversaj Esperanto-aferoj kaj rilataj temoj okazas nur ene de tiu

rondo. En la reto mankas profesia multlingva informejo pri Esperanto kaj la movado, pere de kiu interesigantoj pri Esperanto kiuj ankoraŭ ne bone regas la lingvon povus facile sekvi ĉion, kio okazas en la movado.

Ekzistas nur kelkaj informejoj pri Esperanto, kiuj informas en naciaj lingvoj, sed malmultaj el ili estas bonaj. La plej bona el ili estas la litovlingva "Esperanto mozaika" (emozaika.info), kiu estus uzata kiel bazo por la nova portalo. Ĝi aperis antaŭ pli ol kvin jaroj kaj enhavas sufiĉe profundajn informojn pri Esperanto, la movado, Esperanto-kulturo ktp. De tempo al tempo aperas novaĵoj kaj artikoloj pri ĉi tiuj temoj kaj pri aliaj rilataj temoj, ekz-e pri aliaj lingvoj, lingvopolitiko, diversspecaj aranĝoj ktp.

La paĝaro estas sufiĉe populara; ĉiumonate vizitas ĝin kelkmil vizitantoj (tio estas sufiĉe granda nombro por Litovio). Ĝi funkcias kiel informfonto por interesigantoj pri Esperanto, ĵurnalistoj, studentoj kaj aliaj paĝaroj.

Laŭ statistiko de *lernu!* "Esperanto mozaika" estas unu el la ĉefaj fontoj de litovaj vizitantoj kaj novaj litovaj uzantoj por *lernu!*. Tiamaniere eblas fari konkludon, ke sufiĉe multaj vizitantoj ĉe "Esperanto mozaika" ekinteresiĝas pri Esperanto kaj poste iras al *lernu!* por lerni ĝin.

Ĉe "Esperanto mozaika" ekzistas datumbazo de litovaj Esperanto-parolantoj. La ĉefa fonto de tiuj Esperanto-parolantoj lastatempe estas *lernu!*. Tio do signifas, ke sufiĉe multaj lernas unue Esperanton ĉe *lernu!* kaj poste venas al "Esperanto mozaika" kun deziro movadumi.

Lastatempe sufiĉe multaj esperantistoj el aliaj landoj esprimis deziron havi "Esperanto mozaika" ankaŭ en aliaj lingvoj; pro tio aperis ideo pri multlingva "Esperanto mozaika".

Alia ekzemplo de sukcesa informejo estas la ruslingva "Esperanto novosti" (e-novosti.info). Ĝi estas pli simpla enhave, ĉar enhavas nur novaĵojn kaj forumon, sed ambaŭ tiuj ĉi partoj enhavas multajn interesajn informojn pri

Esperanto. Multaj homoj vizitas la paĝaron, la forumo estas aktive uzata, kelkmil personoj abonas la novaĵojn ktp. Tre ofte ĵurnalistoj trovas multon interesan tie por siaj artikoloj.

La spertoj de tiuj loke orientitaj informejoj montras ke lerta kaj ĝisdata nacilingva informado donas rezultojn. Plua grava pluso de tiaj retejoj estas, ke ili estas montrataj inter la unuaj rezultoj kiam oni faras interretserĉojn pri Esperanto (sed ankaŭ pri pluraj aliaj temoj!) kaj tiel helpas liveradon de ĝustaj informoj pri Esperanto al la ĝenerala publiko. Serĉoj en aliaj lingvoj nemalofte prezentas unuavice kritikajn artikolojn aŭ misinformojn.

Alia fakto estas ke pli kaj pli da homoj eklernas Esperanton per la reto, sed multaj el ili poste ne eniras la movadon kaj/aŭ neniam vere ekuzas la lingvon. Tio aparte iĝis klara en la komunumo ĉirkaŭ *lernu!*. Pro tio estus bone havi bonan inform-portalon, al kiu povus kontribui ajna informema esperantisto aŭ Esperanto-grupo. Ĉiu esperantisto aŭ grupo de esperantistoj ekhavas eblon facile informi pri sia agado al ekstera publiko kaj aldoni propran sinprezenton. Tiamaniere la paĝaro funkcias ne nur kiel informejo, sed ankaŭ kiel "enmovadigilo". La jamaj *lernu!*-helpantoj mem atentigis pri ĉi tiu sia bezono kaj esprimis pretecon ekuzi tian informejon tuj kiam ĝi aperos.

Por resumi, bezonatas informportalo ĉe kiu:

- Esperanto-klubo kaj organizoj havos eblon facile informi pri sia agado kaj kapti novajn movademajn personojn.
- Ĉiuj informemaj esperantistoj povos facile verki aŭ/kaj traduki novaĵojn/artikolojn pri Esperanto en naciaj(n) lingvoj(n), interŝanĝi ideojn, kune verki tekstojn ktp.
- Redaktantoj de artikoloj/novaĵoj ne devos zorgi pri teknikaĵoj, paĝar-strukturo ks.
- Ligilo al *lernu.net* kaj aliaj retaj kursoj estos klara kaj reciproke utila.
- Ekzistos datumbazo de Esperanto-organizoj kaj Esperanto-parolantoj, kiujn oni povos facile kontakti por ekzerci sian Esperanton, ricevi informojn aŭ fari intervjuojn.



La emblemo de E@I

- Aperos informoj pri Esperanto-eventoj, kunlabore kun jam ekzistantaj tiuspecaj paĝaroj.
- kaj kiu estos populara ĉe diversaj serĉmaŝinoj.

Responde al ĉi tiu propono de E@I, ESF diris, ke la projekto ŝajnas subteninda kaj ĝojus ricevi pli detalan projektproponon (tiu estos pritraktita dum la UK en Jokohamo, kie du kernaj membroj de E@I – Jevgenij Gaus kaj Peter Baláz preparolos detalojn kun la estraranoj de ESF)..

Agado rilate la internacian jaron de lingvoj

La Ĝenerala Asembleo de UN proklamis la jaron 2008 internacia jaro de lingvoj, kiel provo akceli unuecon en diverseco kaj tutmondan interkomprenon. E@I proponas uzi ĉi tiun okazon por agado kun jenaj celoj:

- Veki atenton pri Esperanto rilate la internacian jaron de lingvoj
- Eduki la mondon pri kiel Esperanto kaj la Esperanto-movado tre bone kongruas kun la celo "akceli unuecon en diverseco kaj tutmondan interkomprenon"
- Raportigi UN/Unesko pri Esperanto (do peto pri nova "Nitobe-raporto")
- Instigi kaj subteni agadon de vasta Esperanto-movado okaze de la jaro

Por atingi ĉi tiujn celojn, E@I proponas kreon de profesieca multlingva retpaĝaro kaj aldona de libreto pri "Kiel akceli unuecon en diverseco kaj tutmondan interkomprenon?" en multaj lingvoj, de diversaj informiloj en multaj lingvoj, de reklamfilmeto kaj de komputila projekci-prezento. E@I volas partopreni en

diversaj aranĝoj okaze de la jaro (ne nur de Esperantaj organizoj), kaj helpi la organizadon de pluraj lingvofestivaloj.

ESF pensas ke indus fari ion kaj eble pretus subteni tiajn agadojn, sed ŝatus unue havi pli bonan bildon pri kio farindas. Same pri tio okazos kunsido dum la UK en Jokohamo.

Krei gramatik-kontrolilon por Esperanto

Imagu havi altnivelan gramatikkontrolilon por Esperanto kiu atentigus komencantojn pri verŝajnaj eraroj kun ŝanĝoproponoj kaj kiu helpus ankaŭ al spertaj esperantistoj per "kontrollegado" de longaj dokumentoj. Tiaj gramatikkontroliloj ekzistas por multaj naciaj lingvoj, sed ankoraŭ ne por la internacia, almenaŭ ne por la vasta publiko. *Jam temp' está ŝanĝi tion!*

Jam ekzistas literum-kontroliloj en Esperanto (ekz-e por Firefox, por OpenOffice kaj en la Esperantilo). Sed literum-kontroliloj kontrolas nur unuopajn vortojn, dum gramatik-kontroliloj celas kapti erarojn en vortoj aŭ vortgrupoj kie la vortoj mem ekzistas en ĝusta literumo sed eble ne en ĝusta formo (ekz-e konfuzo pri -i/-as aŭ manko de akuzativo).

Gramatikkontroliloj por Esperanto ekzistas hodiaŭ nur en la redaktilo Esperantilo de Artur TRZEWIK (esperantilo.org). Tiu gramatik-kontrolilo estas bona komenco, sed ankoraŭ ne atingis sufiĉe altan nivelon por povi esti uzata de vasta publiko. Sed ĝi estas verkita en tre nekutima programlingvo kaj malfacilus por novaj homoj eniri tiun laboron. Krome, Artur ne interesiĝas pri projekto kun ia financa subteno; li volas havi tutan liberon sekvi sian inspiron kaj laŭ ĝi plulabori pri sia redaktilo. Tial E@I planas projekton por verki novan gramatik-kontrolilon.

Por tio E@I kunigos teamon, en kiu eble kunlaboros jenaj personoj:

- Eckhard BICK (lingvisto kaj esperantisto kiu kunlaboris en la kreado de gramatik-kontrolilo de la dana) – gvidado, analizado, verkado de reguloj
- Bertilo WENNERGREN (spertulo pri

Esperanta gramatiko kaj programado) – analizado, regulkonsilado, programado

- Eventuale la programisto de Eckhard BICK
- Sonja LUNDBERG (ESF-kunlaboranto, studento de komputila lingvistiko; ricevos subtenon de sia universitato por la projekto) – testado, komentado, raportado al ESF
- Judith MEYER (studento de komputila lingvistiko) – testado, komentado
- Hokan LUNDBERG - testado, komentado
- Marek BLAHUŠ (studento de komputila lingvistiko) – testado, komentado

Gramatikkontrolilo kiu atentigus pri gramatikaj eraroj kaj proponus ŝanĝoalternativojn povus esti tre helpa al komencintoj por verki pli klarajn tekstojn kaj samtempe pli bone lerni Esperanton. Krome la kontrolilo povus percepti erarojn en tekstoj de spertaj esperantistoj kaŭzitaj de malatentemo. Alia uzokampo estus kontrolado de kursrespondoj ĉe kursoj kiel ekz-e “Ana Pana” (kurso ĉe *lernu!*).

Pri ĉi tiu projekt-propono ESF diris "se E@I ne faras tion, verŝajne neniu alia faros" kaj ŝajne entuziasmas pri la projekto.

Lernu lingvon

La projekto “Lernu lingvon!” senpage instru(et)os plurajn lingvojn en multaj lingvoj, same kiel *lernu!* instruas Esperanton en multaj lingvoj, sed la kursoj ne nepre devus esti tiel grandaj. La lernoplatformo de *lernu!* povos esti re-uzita, ŝparante multe de programado. Inter la celoj de tiu projekto estos ne nur igi homojn lerni alian lingvon sed altiri lingvemulojn al la paĝaro kaj informi ilin ne nur pri ilia elektita fremdlingvo sed ankaŭ pri Esperanto kaj pri *lernu!*. Ja multaj esperantistoj venas el la aro de lingvemuloj.

La projekto estos signife granda; ankaŭ pro tio prepariĝas kunlaboro kun la ekster-Esperanta mondo (universitatoj, pedagogiaj centroj, ...). Tiu ĉi projekto povus esti rekta (palpebla, reala) pruvo de la protektado de lingvoj fare de la Esperata komunumo kaj ĝia interesiĝo pri aliaj fremdaj lingvoj.

La paĝaro povos iĝi parto de la agado rilate

la internacian jaron de lingvoj.

ESF pensas ke la projekto estus tre bona por eksteraj fondaĵoj kaj ne tre emus subteni ĝin finance, almenaŭ ne la instruan parton de aliaj lingvoj. Sed ESF (kiu ja finance subtenas la projekton *lernu!*) ja permesos ke la iloj de *lernu!* estu uzataj por aliaj lingvoj.

Virtuala prelegejo kaj kunsidejo

Nuntempe multa aktivado de esperantistoj okazas en la virtuala mondo – en la reto. Tre ofte aperas bezono por virtualaj kunsidoj, sed mankas bona ilo por tio. Krome tre ofte en la mondo okazas diverstemaj prelegoj kaj seminarioj (ekz-e tiuj de E@I) en Esperanto, kiujn bedaŭrinde povas partopreni ne tre multe da esperantistoj pro manko de financoj kaj pro longaj distancoj. La rezultojn de tiuj seminarioj ĝuas nur etaj grupoj da esperantistoj. Estus bonege havi ilon, pere de kiu eblus virtuale ĉeesti seminariojn kaj sekvi ĉiujn okazantajn prelegojn kaj kursojn, kaj trarigardi arkivojn de jam okazintaj aferoj. Tre ofte ĉiuj kunsidoj, prelegoj kaj seminarioj okazas nur en Esperanto, do la sola celgrupo estas esperantistoj. Indus ŝanĝi tion, ekz-e eblus aldoni multlingvajn subtekstojn al iuj prelegoj;

tiamaniere eĉ ne-esperantistoj povus vidi kaj kompreni multajn prelegojn.

La projekto helpus al esperantistoj apliki Esperanton en sciencoj, praktike uzi la internacian lingvon por akirado de novaj scioj kaj plifaciligi interkomunikadon. La paĝaro estus kvazaŭ virtuala prelegejo, reta universitato kaj kunsidejo. La sistemo enhavus ĉiujn bezonatajn ilojn por povi interŝanĝi informojn kaj spertojn pri iu temo, kaj okazigi prelegojn kaj trejn-kursojn pri ajna temo. Por esperantistoj la sistemo estus tute senpaga, sed estonte ni povus proponi la novan retejon ankaŭ al aliaj organizoj kontraŭ iu pago.

La tuta sistemo konsistus el tri ĉefaj partoj: kunsidejo, prelegejo kaj arkivo. En la kunsidejo oni povu elekti, ĉu la kunsido estu fermita (alio per pasvorto) ĉu malfermita (ajna deziranto povu aliĝi). Ekzistu la eblo komuniki skribe, voĉe kaj per ret-filmilo, videbligi kunsid-tagordon, protokoli la aferojn, montri bildojn kaj projekci-prezentojn, desegni, vidigi ret-paĝojn rekte en la kunsidejo, voĉdoni (kaj malfermite kaj anonime; la sistemo mem kalkulu kaj montru la rezultojn) kaj konservi la okazintan kunsidon (bildojn, tekston, protokolojn).

La prelegejo funkcius tute simile al la

lernu! june kaj kune www.tejo.org
TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Esperanto (eo) Ekl
Google Custom Search Ekl

Ĉefpaĝo Enkonduko Kursoj Lernado Komunikado Biblioteko Helppaĝoj Pri lernu! Mia lernu!

Bonvenon al lernu!
lernu! estas plurlingva paĝaro, kiu celas helpi al retemuloj informiĝi kaj lerni Esperanton, senpage kaj en facila maniero.
Se vi estas nova ĉi tie, legu unue [Kiel komenci](#).

Gravaj paĝoj
[Subtenu lernu!](#)
[Informu amikojn pri lernu!](#)
[Ofitaj demandoj pri lernu!](#)

Laste en la Esperanto-movado

- La sakraj konkurso – rezultoj!
- Registriĝu al la Somera kursaro de NASK!

Laste aperis en lernu!

- La tujmesaĝilo funkcias denove!
- MP3-versio de Mi estas komencanto
- Pliaj aŭskultebaj partoj ĉe "Gerda malaperis!"
- Nova lernu!-retbutiko
- Novaj kampoj kaj novaj ebloj en

LA VORTARO VORTARO

Eo-Eo
Eo-English
English-Eo
Eo-Български
Български-Eo
Eo-Сeština
Ceština-Eo
Eo-????
????-Eo
Eo-????
????-Eo
Eo-Dansk
Dansk-Eo
Eo-Suomi
Suomi-Eo
Eo-Français
Français-Eo
Eo-Deutsch
Deutsch-Eo
Eo-????
Novaj mesaĝoj (0)

La enirpaĝo de *lernu!*, la plej sukcesa projekto de E@I ĝis nun

kunsideo. La ĉefa diferenco estus tio, ke multajn aferojn rajtus fari nur preleg-vidanto (ekz-e montri retpaĝojn, montri bildojn ktp.) Estus eblo okazigi rektajn video-elsendojn el diversaj Esperanto-seminarioj kaj "virtualaj ĉeestantoj" havus eblon sekvi prelegon kaj fari demandojn.

Ĉiujn okazintajn prelegojn oni povus meti en la arkivon. Enmeti en la arkivon oni povus ankaŭ tiujn prelegojn, kiuj ne estis rekte elsendataj, sed tamen estis filmitaj. En la arkivo oni povus vidi video-elsendon, alŝutitajn bildojn (ekz-e projekci-prezenton, kies projekciaĵoj ŝanĝiĝus sinsekve dum la prelego en bezonataj momentoj). Por prelegoj en la arkivo oni povus aldoni tradukeblajn subtekstojn. Estus eblo komenti ĉiujn aferojn en la arkivo.

Nova traduksistemo

La multlingvaj retpaĝaroj kreitaj de E@I (kiel *lernu!*) uzas traduksistemon, kiu faciligas la tradukadon de la retpaĝaroj al multaj lingvoj. La projektoj iĝas pli kaj pli grandaj kaj profesiaj; pro tio gravas, ke la traduksistemo ankaŭ evoluu kaj konstante pliboniĝu. E@I provis plibonigi ĝin ĉe *lernu!*, sed bedaŭrinde ne eblis tute reverki la sistemon, ĉar ĝi jam estis forte kunligita kun la cetera paĝaro. Pro tio necesis novajn aldonojn kaj plibonigojn aldoni al la malnova sistemo. Rezulte la traduksistemo de *lernu!* estas miksaĵo de malnovaj kaj novaj aferoj. Estus tro komplike ekuzi ĝin kun ĉiuj plibonigoj por iu alia projekto.

Indus krei novan traduk-sistemon, kiu ekde la komenco enhavus ĉiujn bezonatajn ilojn, estus universala kaj facile instalebla ĉe ajna projekto de E@I.

La nova traduksistemo povus esti bela donaco al internaciaj NRO-j dum la jaro de lingvoj.

Komputeko

Komputeko (komputeko.net) estas la mallongigo de **Prikomputila terminokolekto**. La Pekoteko (perkomputora terminokolekto de Rüdiger Eichholz) inspiris uzi tiun nomon.

Komputeko ne estas vortaro, nek vera terminaro. Ankaŭ ĝi ne volas anstataŭi ekzistantajn iniciatojn (kiel Komputada Leksikono kaj ReVo), sed male ilin plifortigi – plifaciligante la aliron al kaj la komparon inter la diversaj vortaroj.

Komputeko volas esti *portalo de prikomputilaj terminoj en kiel eble plej multaj lingvoj*, inter ili Esperanto, por stimuli ĝustan lingvouzon kaj kontraŭi la uzadon de (ofte fuŝa formo de) usonangla termino.

Ĉefaj celoj estas

- plibonigi la lingvouzon de la esperantistaro
- protekti lingvojn kaj kulturojn
- kolekti komputilajn terminojn sur unu lokon multlingve

Pri la projekto jam ekinteresiĝis ekster-Esperantaj organizoj kaj unuopuloj (ĉefe de la liber-font-programara mondo); oni esperas pri la pli granda disvastigo de la ĵus ekita projekto baldaŭ. Ĝia retadreso estas www.komuteko.net.

Krom la menciitaj ekzistas amaso da novaj ideoj (ekz. eldono de lernu-materialaro en papera formo, DVD-filmo "Esperanto estas..." ktp.), kelkaj de tiuj pli konkretaj ol aliaj – vi certe baldaŭ ekscios pri pluaj novaj realigataj projektoj de E@I – ĉar ideoj kaj laboremo estas aferoj, kiuj ĝis nun (dank' al Dio :) daŭre ne mankas en la juna organizo.

Se vi volas esti plu informita pri la agadoj de E@I, vi povas senkoste iĝi membro de E@I per aliĝo al ĝia dissendolisto. Por tio sendu malplenan mesaĝon al ecxei-membroj@yahoo.com (kaj resendu la konfirm-mesaĝon, kiun vi ricevos). Vi povas subteni E@I per viaj konoj de ekzemple programado, organizado, informado kaj aspektigado. Alia maniero subteni ĝin estas per mondonaco por plifortigi la organizon aŭ apartan projekton. Por pliaj informoj, vizitu ĝian retpaĝaron: www.ikso.net

Ĉi tiu artikolo estis verkita de Marcos CRAMER surbaze de tekstoj el la vikio de E@I (vikio.ikso.net)

Unua reta turniro de pokero por Esperantistoj

Teksasa Tenpokero ekscitigas la mondon! Amikumu organizis la unuan retan turniron de pokero ekskluzive por esperantistoj.

Post kiam amatora pokerludanto Chris Moneymaker venkis kontraŭ la profesiuloj ĉe la Mondĉampioneco de Pokero kaj gajnis 2,5 milionojn da usonaj dolaroj, Teksasa Tenpokero (Texas Hold 'em) eksplodiĝas en populareco en televido, filmoj ktp.

La ekscitiga parto pri la pokera varianto Teksasa Tenpokero estas ke oni bezonas multe pli da lerteco ol bonŝanco – ĉiujare preskaŭ la sama grupo de profesiuloj atingas la finan tablon de la ĉampioneco venkante kontraŭ miloj da kunludantoj. Por venki en Teksasa Tenpokero, oni devas kompreni ne nur probablecojn, sed ankaŭ psikologion por povi superpensi siajn kontraŭulojn. Televidaj kanaloj kiel ESPN kaj Eurosport dissendas programojn pri Teksasa Tenpokero kun komentario por ke oni povu kompreni kiel la

plej bonaj ludantoj pensas kaj venkas, eĉ kun la plej aĉaj kartoj!

La sola problemo pri ĉi tiu mensa sporto estas ĝia reputacio – oni ofte grupigas pokeron kun kazinaj ludoj: rapida maniero perdi monon. Povas esti, se oni elektas dependi de bonŝanco aŭ se oni ne zorgas pri sia investo, sed ankaŭ povas esti maniero gajni multege da mono, ekzemple nur kostis 39 usonaj dolaroj al Chris Moneymaker por eniri retan turniron en kiu li kvalifikiĝis por la mondĉampioneco kaj gajnis 2,5 milionojn da usonaj dolaroj. Feliĉe, oni ne bezonas investi monon por ludi pokeron, almenaŭ ne se oni ludas rete. Ĉiuj poker-retejoj ofertas ludojn kontraŭ ludmono kaj krome ekzistas "freerolls" – senpagaj turniroj kiuj eble havas monajn premiojn.

Unu tia senpaga turniro jam okazis ekzkluzive por esperantistoj je la 21-a de julio. Ĝin organizis Amikumu.com. Amikumu planas sekvontajn turnirojn je la 1-a de septembro kaj 13-a de oktobro.

Se vi ne scipovas ludi pokeron, facilas lerni ĝin per nova paĝaro en Esperanto pri pokero (www.learnlangs.com/pokero). Ĉiukaze estas amuza maniero montri al la mondo ke Esperanto vivas!

Pli da informoj ĉe Amikumu: amikumu.com/games/pokero

Laŭ artikolo de Chuck Smith aperinta en Libera Folio



Foto el Vikimedia Komunejo

Informvideo pri Raporto.info

Sur YouTube aperis interesa informvideo pri la interreta esperantlingva novaĵservo raporto.info: [youtube.com/watch?v=NTIF-bOJe8s](https://www.youtube.com/watch?v=NTIF-bOJe8s)

Volontuli en Afriko

John K. TUATO varbas por sia humaneca asocio CAVOT volontulojn mallongdaŭrajn (labortendaroj, kutime trisemajnaj), mezlongajn, kaj longdaŭrajn en Togo, Ebura bordo kaj Ganao. Li aŭdis pri Esperanto – kvankam ne de togaj esperantistoj – kaj interesiga.

Li estus favora al instruado de Esperanto (ekz-e unu horon ĉiutage) en iuj labortendaroj kun internacia partoprenantaro, se volontulo tion kapablas kaj proponas. La kondiĉoj por esti volontulo estas:

- mem pagi sian vojaĝon (aŭ trovi stipendion

por tio)

- pagi 20 eŭrojn da aliĝo, kaj 200 eŭrojn por restadkosto (por tri semajnoj)
- Por longdaŭra volontulado, oni pagas 150 eŭrojn monate por restadkosto.

Pli da informoj troviĝas en franclingvaj dokumentoj de la asocio elŝuteblaj sur www.tejo.org/eo/CAVOT. Oni povas rilati kun li franc- kaj anglalingve, sed ĝis nun ankoraŭ ne en Esperanto.

Laŭ mesaĝo de Jeanne-Marie CASH

Esperanto-urbo Herzberg 1-jara

Jen komuna ĝojo: kreskanta bebo en la Esperanto-movado! Kiel TEJO Tutmonde antaŭe informis, je la 1a de julio 2006 la urba konsilantaro (kun politikistoj el ĉiuj kvar partioj) de Herzberg am Harz decidis, ke la urbo Herzberg ricevu la oficialan titolon, kromnomon Herzberg - la Esperanto-urbo! Tio estas unika Esperanto-fenomeno en la mondo. Certe ekestas nova kaj daŭripova hejmurbo por la Esperanto-movado entute.

1) Kio okazis en la unua jaro?

a) Minimume 100 gazetartikoloj aperis (la ĉi-jarajn en germana lingvo vi povas legi ĉe: esperantourbo.spaces.live.com)

b) sur la oficiala hejmpaĝo de Herzberg nun estas multaj tekstoj en Esperanto, www.herzberg.de

- en la turisma oficejo oni salutas vin Esperante,

- pri kelkaj urbaj vidindaĵoj vi povas legi Esperantlingvan broŝuron,

c) en diversaj lernejoj okazas Esperanto-kursoj,

ĉ) estas lingvokursoj ankaŭ por plenkreskuloj, urbaj dungitoj, ktp.

d) konstanta informado per afiŝoj, manfolioj

kun Esperanto-vortoj por la enloĝantaro,

e) aperis la unuaj ZEOj*:

- oficiala surskribo de urba kulturdomo kun la teksto: Domo de la renkontiĝo,

- granda 6-metra bonvenigtabulo en la urbocentro ĉe la turisma oficejo de la Malnova Urbodomo,

- inaŭguro de Joachim Gießner-memorejo en la parko antaŭ la stacidomo,

- vojmontriloj al la Esperanto-centro,

- informtabuloj de nova rondvojo "Akvo-ok" kun resumaj tekstoj en Esperanto,

- unuaj manĝokartoj en Esperanto, salato en greka restoracio ricevis la nomon: Esperanto-salato, ktp.

f) konstantaj kontaktoj kun lokaj politikistoj, g) daŭriĝo de la ĝemelurba projekto "Pontlingvo Esperanto" kune kun Internacia Esperanto-feriumado por gelernantoj el Herzberg kaj Gora (Pollando), kaj multaj aliaj taskoj, eventoj,

h) konstanta kursejo, seminariejo kaj ekzamenejo (por GEA kaj ILEI),

i) organizado de fakseminarioj, ekskursoj, ktp.

j) pluevoluigo de granda fakbiblioteko kaj specialarkivo ekz-e kun gazetoj, Esperanto-

muziko kaj vidbendoj

2) Kio okazos en la komenco de la dua jaro en Herzberg - la Esperanto-urbo?

a) Pluraj restoracioj volas krei novajn Esperanto-manĝaĵojn kaj ĉirkaŭ 20 restoracioj petas manĝokartojn en Esperanto,

b) la unuaj bildkartoj kun la nova simbolo de la urbo estas en presejo,

c) Esperantlingva urboprospekto estas en preparo,

ĉ) pretiĝas lumdisko (KD) kun prezentad-materialo pri la urbo kaj pri Interkultura Centro Herzberg (ICH); ĝi estos aĉetebla ekze ĉe UK kaj aliaj grandaj Esperanto-aranĝoj, aŭ estas mendebla de ICH

d) la urboadministracio preparas 11 oficialajn bonvenigŝildojn en Esperanto por saluti enveturantojn en la urbon,

e) meze de julio antaŭ la UK 2008 estos granda datrevenfesto okaze de la dua naskiĝtago de la nova Esperanto-urbo,

3) Bonvolu rigardi ankaŭ niajn fotoalbumojn per nia hejmpaĝo: ic-herzberg.de

4) Urbestro Gerhard WALTER kaj la urba

konsilantaro estas malfermaj al la Esperanto-mondo! Herzberg - la Esperanto-urbo atendas vin, viajn realigeblajn ideojn, kunagadon, moralan kaj financon subtenon!

Ĉu vi serĉas perfektigon de via lingvokono? Ĉu vi ŝatus ripozi, ekskursi en la apuda Nacia Parko Harz?

Ĉu vi pretas volontuli kaj helpi nian Esperanto-centron?

Ĉu vi povus kaj ŝatus ankaŭ finance kontribui al la realigo de niaj projektoj? Bonvolu rigardi la menupunkton "Alvoko" por helpo sur nia retpaĝaro.

La konto ĉe uea estas ikch-a. Same bonvenas gratulleteroj, donacoj, ktp. Dankon! Ĉu vi ŝatus translokiĝi al Herzberg - la Esperanto-urbo, loĝi kaj vivi tie?

Bonvenon!

Amike salutas j. k. Petro Zilvar, Marika Frense, Zsafia Korody kaj aliaj estraranoj

* ZEO estas mallongigo por Zamenhof/ Esperanto-Objekto

Unua Esperanto-salato en Herzberg – la Esperanto-urbo pretas

Je la 30a de junio 2007 granda grupo kun homoj el Herzberg kaj el diversaj lokoj en Germanio kaj el Belgio, Nederlando, Hispanio kaj Hungario gustumis la unuan Esperanto-salaton en la greka restoracio Akropolis en Herzberg. La nova bongusta kreitaĵo ekzistas el diversaj freŝaj verdaj salat-elementoj kaj el kaprinoformaĝo. Sur la Esperanto-salato troviĝas kvinpintaj steloj el verda papriko. Oni celebris la debutan Esperanto-salaton en gaja internacia rondo kun gaze-taraj fotoj. Specialaj grekaj alkoholaĵoj dum la unika evento je bonfarto de la Esperanto-movado ne mankis. Krome oni transdonis la ampleksan kaj kompletan tradukitan version de la esperantlingva manĝokarto. Ĝin tradukis Dirk Bindmann el Zeitz. En la Esperanto-urbo Herzberg multaj restoracioj petas propran Esperanto-menuon kaj pli ol 20 restoracioj esperantlingvaj manĝokartojn kaj por esperantlingvanoj kaj por germanaj gastoj. Tio estas granda defio por la tuta Esperanto-movado.

Certe estas novaj spertoj, ke oni ne nur povas paroli kaj kanti en Esperanto, sed ankaŭ gustumi la novajn manĝkreaĵojn.

Informu pri via agado sur tejo.org

Se vi faris aŭ planas agadon, kaj volas informi aliajn junajn Esperantistojn el la tuta mondo pri tio, vi povas uzi la retpaĝaron de TEJO (tejo.org), kiu ebligas al vi mem enmeti informojn. Jen la klarigoj pri kiel fari tion:

1) Kreu konton ĉe tejo.org se vi ankoraŭ ne havas tion. Por fari tion, klaku la lilion por "Krei novan konton" sur la ĉefa paĝo.

2) Skribu al Chuck SMITH (chuck@tejo.org) ke vi estas membro de TEJO (efektive) kaj li aldonos al vi rajton havi blogon.

3) Kiam vi estas ensalutinta, klaku sur la dekstra menuo "Krei enhavon" kaj poste "blog-enskribo". Tie vi povas meti la informon.

4) Se ĝi vere estas gravega informo, klaku sur "Publishing options" kaj poste "Montrata en la ĉefpaĝo". Poste klaku la butonon "Eldoni".

Se vi havas demandojn, Chuck SMITH estas je via dispono.



TEJO | Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Enhavo

- o What is Esperanto?
- ▶ Pri TEJO
- ▶ Aktivuloj
- o Dissendolistoj
- ▶ Eldonoj
- ▶ Eventoj
- ▶ Fakaj Sekcioj
- o Forumo
- ▶ Landaj Sekcioj
- o Membroj
- ▶ Partneroj
- ▶ Pasporta Servo
- ▶ Helpu TEJO-n
- o Kontakto nin

Pri TEJO

TEJO popularigas internacian komprenigon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturalan riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan komprenigon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

- Agado
- Dokumentoj

Ensaluto

Uzantnomo: *

 Pasvorto: *

- Krei novan konton
- Peti novan pasvorton

Navigo

- o lastaj popularaj enhavaĵoj
- o recent posts

Novaj forumaj temoj



La enirpaĝo de la retpaĝaro tejo.org

Sakraĵkonkurso


La Norvega Junularo Esperantista organizis konkurson pri esperantlingvaj sakraĵoj. La organizo volis pruvi ke malgraŭ la antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto la lingvo kapablas esprimi fiaĵojn.

La kriterioj de la konkurso estis ke la kontribuoj ne ataku unuopulojn, sed tamen estu trafaj, vulgaraj, ofendaj kaj originalaj. Alvenis 57 esprimoj, aldone al retpaĝo kiu povas fabriki insultojn. Eblis grupigi la 57

esprimojn en la jenajn ĝenrojn:

- admono kaj konstatoj
- priskriboj
- ekkrioj kiuj estis maldecaj sed ne tre insultaj

Pluraj kontribuoj estis evidentaj tradu-



kajoj el aliaj lingvoj kaj do ne estis sufiĉe originalaj. La juĝkomisiono aldonis kelkajn kriteriojn: La esprimoj estu relative facile kompreneblaj, ili ne estu tro longaj, kaj estu facile prononci ilin. Almenaŭ unu kontribuo rompis amason da tabuoj kaj insultis plurflanke, sed mankis al ĝi la humura elemento kiu devas esti en ĉiu bona sakraĵo.

La juĝkomisiono laboris retroŝte. Fine ĝi povis konkludi pri la tri plej bonaj insultoj:

- Unua Premio: "Fiku fratino de erinaco" de Etel Zavadlav, Kroatio
- Dua premio: "Serĉu vian kacon per pinĉilo" de Etel Zavadlav, Kroatio
- Tria premio: "Vi estas pli delikata ol felo de fekaĵo" de Manuel Pancorbo Castro, Hispanio

Pli da informoj troveblas sur la retpaĝo esperanto.no/nje/eo/konkurso.php.

AGO-TAGO en Kubo

Okaze de la 28a datreveno de Kuba Esperanto-Asocio, la Provinca Filio de Esperanto en la urbo Santiago de Kubo okazigis la AGO-TAGON sabaton, la 16an de junio. Dum la AGO-TAGO oni malfermis ekspozicion grafikan, literaturan kaj fotografian ĉe la provinca biblioteko kie partoprenis pli ol 40 personoj, inter kiuj troviĝis geesperantistoj, ĵurnalistoj, reprezentantoj de aliaj neregistaraj organizaĵoj, reprezentantoj de la registaro kaj kelkaj invititoj.

Kantinte la Nacian kaj Esperantan Himnojn, junulino deklamis poemon verkitan de Nia Nacia Heroo, *La Rozo Blanka*. Bonvenigis la ĉeestantojn sinjoro Gonzalo Collantez Garcia kaj Alberto Fong Delgado, prezidanto de la Provinca Filio, poste sinjoro Fabio Silegas kantis kanzonon titolitan *20 Jaroj*. Sekve oni omaĝis kelkajn fondintojn de Esperanto en Santiago kiuj laboris por Esperanto iam antaŭe, oni disdonis atestilojn kaj florojn al la geomaĝuloj. Daŭrigante la AGO-TAGON sinjoro Juan Ramon, estrarano de Kuba Esperanto-Asocio, prelegis pri la historio de Esperanto en Kubo.

Aliflanke ankaŭ oni donacis kelkajn esperantajn librojn al la bibliotekestrino kaj je la fino ĉiuj ĉeestantoj estis invititaj rigardi la ekspozicion.

Guillermo Bes Salazar



Kelkaj el la fondintoj de la Esperanto-movado en Santiago

Klaku.net

Dezirante havi bonan disvastigon de Esperanto kaj centran punkton de la Esperanta blogaro, oni konstruis la socian projekton Klaku. La aventuro komenciĝis; ĉu vi jam tajpis ĝin en vian TTT-legilon? Klaku estas socia paĝaro en la nuntempa Reto 2.0 kiu permesas al vi publikigi artikolojn libere. La uzantoj povas kaj baloti kaj klakumi viajn eldonojn kiam la ligiloj aspektos gravaj aŭ interesaj laŭ ili. Ĝis nun, la esperanta blogaro ne estis rete interkonektita. Klaku, ekde ĝia komenco, celas esti la deirpunkto de kie la reta engaĝiĝo povas kreski, kaj kune kun Klaku ĉiuj aliaj projektoj ankaŭ kreskos. Klaku helpas la diskonigo de via blogo! Uzu ĝin, ĉar ĝi estas la projekto por teksti la disan Esperantan reton.

Sur Klaku.net ĉiuj rajtas publikigi novaĵojn aŭ artikolojn, videojn aŭ bildojn, skribi komentojn kaj komenti aliajn komentojn, ktp... ĉiam libere kaj tute senpage. Tamen, se iu faras personajn atakojn aŭ iel minacas aliajn geuzantojn pro iu ajn kialo, oni forviŝos lian uzant-nomon. Interreto ne estas loko por insulti la homojn. Ĉiuj rajtas havi siajn proprajn ŝatojn kaj sentojn, kaj Klaku montros vin ke tio ĉi funkcias.

Por duboj aŭ komentoj, bonvolu skribi al info@klaku.net kaj iu respondeculo kontaktos vin.

Joan CATALA
www.klaku.net

Komenco Ensalutu Aliĝu Kio okazas nun? Oftaj uzantoj Etikeda nuboj

KLAKU

Klaku.net Beta Komenco » Popularaj novaĵoj Ordigi novaĵojn laŭ: Publika novaĵejo | Plej oftaj de: Hodiaŭ | Hieraaŭ | Semajno | Monato | Jaro

8 Klaku **Razeno blogas Esperante... UK en Jokohamo malfermigxis**
Sendita de [fairo](#) 15 horoj antaŭe (<http://razeno.blogspot.com>)
 Sekcio: [esperanta movado](#) | Etikedoj: [universala kongreso uk2007 jokohamo](#)
 Razeno blogas pri la malfermo de la UK en Jokohamo. [legu pli](#) »
 3 komentoj | [Sendu al...](#) | [Informu amikon vian](#) | [Entombigu](#)

10 Klaku **Informilo de la venonta kongreso de jokohamo**
Sendita de [nirakor](#) 14 horoj antaŭe (<http://www.k4.dion.net/jo>)
 Sekcio: [esperanta movado](#) | Etikedoj: [kongreso jokohamo](#)
 kongresa kuriero "Ondas Jokohamo" [legu pli](#) »
 5 komentoj | [Sendu al...](#) | [Informu amikon vian](#) | [Entombigu](#)

11 Klaku **ESPERANTO 2.0: Pri samgraveco de diversaj agadkampoj**
Sendita de [ladislao](#) 1 tago 18 horoj antaŭe (<http://vo.vavajo.blogspot.com>)
 Sekcio: [esperanta movado](#) | Etikedoj: [zamenhof libro literaturo](#)
 Ni serĉis la respondojn je tiuj demandoj, kiuj respondus pri kiel organizi kaj kunordigi la diversajn fak- kaj kampagadojn ene de HEA? Ĝis nun mi identigis tri pli konsiderindajn agadflankojn... [legu pli](#) »
 komentu | [Sendu al...](#) | [Informu amikon vian](#) | [Entombigu](#)

13 Klaku **Legenda Klasikaĵo estas denove havebla**
Sendita de [gufule](#) 1 tago 22 horoj antaŭe (<http://uea.org>)
 Sekcio: [esperanta movado](#) | Etikedoj: [zamenhof libro literaturo](#)
 Unu el la plej famaj Esperanto-libroj, "Vivo de Zamenhof", estas denove havebla. Sojle de la Jokohama UK aperis ĉe UEA la sesa eldono de tiu ĉi verko, unue eldonita en 1920, nur tri jarojn post la forpaso de Lazaro Zamenhof (1859-1917). [legu pli](#) »
 komentu | [Sendu al...](#) | [Informu amikon vian](#) | [Entombigu](#)

Kio estas Klaku.net?
 Klaku.net estas Socia Reto 2.0 malfermita al ĉiuj [legu pli](#)

Aliĝu
Aliĝu
 Uzant-nomo:
 Retadreso:
 Pasvorto:
 Retajpu vian pasvorton:
 [legu pli](#)

10 plej legitaj etikedoj
esperanto foto hungario interreto komputilo kongreso lingvo muziko uea vikipedio

Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturalan riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044

Faksilo: (010) 436 1751,

Retadreso: uea@co.uea.org

Estraro de TEJO

• Chuck SMITH (Informado, UEA-Rilatoj)

Leiblstr. 31, DE-74081 Heilbronn, Germanio

Retadreso: chuck@tejo.org

• David-Emil WICKSTRÖM (Prezidanto, IJK)

Fuglegårdsvænget 57, 1tv, 2820 Gentofte, Danio

Retadreso: dew@tejo.org

• François HOUNSOUNOU (Landa kaj Afrika

Agado, ILEI-Rilatoj)

B.P. 226, BJ- Lokossa, Mono, Benino

Retadreso: frank@tejo.org

• Haris SUBAŠIĆ (Eksteraj Rilatoj, Vicprezidanto)

Zagrebačka 80, BA-88000 Mostar, Bosnio-
Hercegovino

Retadreso: hara@ikso.net

• Katja IGNATIEVA (Kasistino)

c/o Magnini via Don Minzoni 38, IT-20091 Bresso
(Mi), ITALIO

Retadreso: katja@tejo.org

• Valentina SIDOROVA (Ĝenerala Sekretario)

3, rue des Nereides, 78180, Montigny-Btx, Francio

Retadreso: valentina@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblecon partopreni en seminarioj
- eblecon havi blagon ĉe tejo.org
- eblecon involviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da eblecoj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" - TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo - eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmaniero, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

TEJO serĉas volontulon!

TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. TEJO-volontulo devas preti labori dum 12-18 monatoj kiam la periodo de volontulado de la nuna TEJO-volontulo Kasia Marciniak finiĝos, do ekde la 1a de novembro 2007. La limdato por kandidatiĝi estas la 15a de septembro 2007. (Se ĉi tiu numero de TEJO Tutmonde atingas vin iom pli poste, vi tamen ankoraŭ povas kandidatiĝi, sendante vian kandidatiĝon kiel eble plej rapide post la ricevo de la numero).

TEJO strebas al tio, ke konstante estu TEJO-volontulo en Centra Oficejo, kiu povu dediĉi cent elcentojn de sia laborotempo al TEJO. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de TEJO, sed samtempe signifas spertan pliriĉiĝon ne nur personan, sed ankaŭ movadan. La estraro limigas la daŭron de volontulado al proksimume unu jaro, tiel ebligante al multaj akiri tiujn spertojn.

La TEJO-volontulo ankaŭ dum kongresoj (IJK kaj UK) kaj TEJO-seminarioj estu la "vizaĝo" de la organizo, informante al membroj kaj aliaj interesatoj pri agado, aranĝoj, servoj ktp de TEJO.

La TEJO-volontulo laŭeble:

- havu tre bonan Esperanto-nivelon (legan, skriban kaj parolan)
- scipovu la anglan kaj (/aŭ) francan, scipovo de aliaj lingvoj estos pozitive konsiderata
- ŝatu administran laboron
- estu sperta pri komputil-uzado (retpoŝto, interreto, tekstprilaborado ktp)
- havu profundajn konojn de la junulara Esperanto-movado
- estu kapabla memstare preni decidojn
- estu preta aktive kunlabori kun la estraro de TEJO rilate al la ĝenerala funkciado de la organizo

- havu konojn de la eŭropaj junularaj strukturoj kaj eŭropaj instancoj

La laboro konsistas el:

- pritraktado de la poŝtaĵoj (paperaj kaj retaj) de TEJO
- prizorgado de la TEJO-arkivo
- administrado kaj prizorgado de kontaktoj kun eŭropaj kaj neeŭropaj strukturoj kaj organizoj
- aktiva subtenado de la agado de la estraranoj kaj komisiitoj de TEJO
- aktiva kunlaborado en la verkado de subvencipetoj
- aktiva kunlaborado en la aktualigo de la retpaĝoj de TEJO
- eventuala redaktado de TEJO-Aktuale

La volontulo ricevas senkoston ĉambron en la CO kaj dignan poŝmonon kiu garantias la vivtenon.

Kandidatoj estas invitataj sendi al la Centra Oficejo kaj estraro de TEJO la jenajn dokumentojn:

- vivresumon (priskribas viajn studojn, kursojn, spertojn ktp)
- motivigan leteron (priskribas kial vi volas volontuli por TEJO)
- laŭeble pruvilojn de la supre postulataj kapabloj kaj rekomendleteron de ekzemple landa Esperanto-organizo.
- Se vi kandidatiĝas per retpoŝto, bonvolu skribi kaj al oficejo@tejo.org kaj estraro@tejo.org

Grave:

Momente TEJO-volontulo devas daŭre labori en la Centra Oficejo en Roterdamo. Nunaj kondiĉoj en Nederlando ne permesas al TEJO akiri labor- aŭ restad-permeson por ne-civitanoj de Eŭropa Unio. Tial la kandidato devas mem havi rajton laŭleĝe restadi dum la necesa periodo sur la teritorio de Nederlando.